

## Programskizo de VEKI 15-an de majo 2020

### 53-a Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI

Por la **Tago de la Inauguro** (25-an de julio) ĉio pretas por la Ĉefplado, centra parto de la Tago. Respondeca estrarano Mireille Grosjean. Ŝi faros enkondukan prezenton. Sekvos prelego pri la Konferenca Temo « Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj » ; prelegonto difinota. Venos deklamado fare de Miguel Fernandez. Poste aŭdiĝos prelego de Mireille Grosjean : « Planeda pripenso » anstataŭ nacia vespero. La kulmino estos kantado kun denove Miguel Fernandez. En la dua sesio de tiu unua tago « Azia Mateno » okazos joko-kurso kaj prelego de Mireille Grosjean pri la temo « Mateno », ĉar ni estos en Azia Mateno.

Por la **Tago de la Komitato, Strukturoj**, (26-an de julio) informo iris al la Komitato de ILEI. Respondeca estrarano Mireille Grosjean.

Por la **Tago de la Lingvoj kaj Lingva Festivalo** (27-an de julio) informo kaj invito iros tra la sekciestroj. Respondeca estrarano Elena Nadikova.

Por la **Tago de la Konferenca Temo « Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj »** (28-an de julio) informo kaj invito iris al la membroj de la Komisiono de ILEI pri Universitata Agado kaj al pliaj profesoroj en la mondo. Respondeca estrarano Ivan Colling.

Por la **Tago de la Ligo**, (29-an de julio) kie okazos la **Gastronomia Rondo**, informo kaj invito iris tra la sekciestroj. Respondeca estrarano Elena Nadikova.

Por la **Tago de Pedagogio** (30-an de julio) informo iris tra la sekciestroj. Respondeca persono : Elisabeth Le Dru.

Por la **konkluda Tago** (31-an de julio) okazos AMO-seminario. Prezento de la 54-a ILEI-Kongreso en 2021. Konkludo. Respondeca estrarano Mireille Grosjean

Dudeko da **artistoj** ricevis informon kaj inviton prezenti koncerton okaze de VEKI. Iu alia povas aliĝi. Respondeca estrarano Mireille Grosjean.

Kontakto ekzistas inter ILEI kaj E@I, firmao slovaka kaj esperantista, kiu prizorgas platformon similan al skajpo kaj zomo. Okazos kunlaboro.

Nova artikolo aperis en vikipedio :

[https://eo.wikipedia.org/wiki/53-a\\_Virtuala\\_Esperanto-Konferenco\\_ILEI\\_2020?fbclid=IwAR2-2FfzpKeiwfLS1fWLMUlcM-5nOVOexZTS6a3YKpHoj100DWhgn-zNDwk](https://eo.wikipedia.org/wiki/53-a_Virtuala_Esperanto-Konferenco_ILEI_2020?fbclid=IwAR2-2FfzpKeiwfLS1fWLMUlcM-5nOVOexZTS6a3YKpHoj100DWhgn-zNDwk)

Nova programskizo aperos la unuan de junio 2020.